

INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA
:- PRI ĈIO, KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON. :-

Sendu ĉion, kio rilatas al la Redakcio kaj Administracio al **W. NUTTERS**, Ostadestraat 94, Amsterdam, Nederlando. :- :-

ABONO: jare 1 Sm. (holande: 1 gulden 20 cent), duonjare $\frac{1}{2}$ Sm. Helpabono: jare almenaŭ 2 Sm. Konto ĉe la Ĉekbanko. :-

Nia organo kaj nia literaturo.

I. S. R., nia organo, devas provizore ankoraŭ resti monata.

Jen la kialoj. Dum la tuta nuna jaro la nombro de la legantoj ne kreskis — ĝi konstante ondis, kun videbla inklino al malgrandiĝo. Kiam en iu urbo la legantaro kreskis, tiam aliloke ĝi malaltiĝis, aŭ tute malaperis de la listo. Krom tio, pli kaj pli ekaperas la fenomeno de la *malfacila pagado* kaj de *nepagado*. Pro tio eĉ la nuna stato de nia organo estas tute ne ankoraŭ certa. Administranto ne scias, kiom pagantaj legantoj I. S. R. havas.

Se ni plioftigus la aperadon, tiam — laŭ la admonoj de kelkaj k-doĵ agentoj kaj laŭ la (ne senbaza) antaŭsento de l' administranto — la nombro da abonantoj senteble malpliĝus, eble tuj duoniĝus. Ke tiu perdo estus tuj anstataŭigebla per novaj abonantoj, tio ne estas verŝajna — ĉar administranto kun deko da kamaradoj jam traserĉis la tutan mondon, kaj ne estas verŝajne, ke ie sur la tero ekzistas iu grava kvanto da socialistaj esperantistoj, ĝisnun ne ankoraŭ trovita.

Plioftigo de la aperado nur estus en tiu kazo sendanĝera, se la prezo povus resti sama: 1 Sm. jare. Tio estus nur tiam ebla, se la legantaro grandege pliiĝus. Ĉar tio certe ne okazos, povas ĉiu facile elkalkuli, ke ne estas eble, restigi sama la nunan, apenaŭ sufiĉan prezon por duobliĝinta aperado.

Do: nune la legantaro ne kreskas; la pagado estas dezirinda; la nunaj enspezoj ebligas apenaŭ la nunan aperadon, kaj duobligo de l' prezo por pliofta apero ankoraŭ plue malgrandigus la legantaron.

Pliofta apero estas nur tiam ebla, se la legantaro volas pagi la duoblon de l' nuna prezo, kaj prefere antaŭe. Aŭ ankoraŭ tiam, se la plioftigo sen prezaltigo estas ebligata per eksterordinaraj enspezoj, subvencioj k.t.p. Ĉar nek la unu, nek la alia estas verŝajna, tial administranto proponas: lasi I. S. R. ankoraŭ monata organo, ĝis tiam, kiam la nombro de l' legantoj permesas plioftigi ĝin ne pliigante la prezon.

Kelkaj k-doj konsilas: lasu I. S. R. monata, sed pliigu la nombron de l' paĝoj. Tio, kompreneble, estas nur alia formo de plivastigo. Ankaŭ presigi I. S. R. per literoj pli etaj estas nenio alia ol plivastigo. Ĉiun literon, kiun I. S. R. enhavus pli ol nun, kostus plian monon. Kaj tion la kaso ne permesas.

K-do Tagulo, subtenante la proponon pri plioftigo de I.S.R. prezentas donaci por tio 5 Sm., se almenaŭ tri aliaj k-doj faros same. (Tiel ni povus formi apartan kason por aperigi de tempo al tempo eksterordinaran numeron. Adm.)

Pri la enhavo ne ĉiuj k-doj estas kontentaj. Precipe la „Socia Movado” estas atakata. Kelkaj k doj opinias ĝin tute superflua — ĉion, kion ĝi enhavas, almenaŭ pri la grandaj landoj, oni jam scias. La sekvo de tio estus, ke preskaŭ neniu legus tiun parton de nia organo. Aliaj plendas, ke la aŭtoroj de „Socia Movado” ĝenerale ne verkas interesige nek senpartie; kaj ke ili en la ĥaoso de l' okazajoj ne bone scias elekti — ke ili preterpasas la grandajn problemojn kaj longspire raportas pri „diversaĵoj”.

Al tiuj k-doj redakcio devas respondi, ke jurnalismo estas metio, same kiel ĉarpentado, tajlorado k.t.p. Senriproĉari kostumon povas nur fari sperta tajloro — same estas koncerne gazeton, kvankam ĝenerale oni kredas, ke oni nur bezonas aĉeti plumon por esti aŭtoro. Nu, nia Revuo estas ankaŭ ekzercejo por estontaj esperantaj aŭtoroj, verkantoj, raportantoj. Ĉiu kunlaboranto pripensu, tamen, ke en jurnalismo ekzistas kvazaŭ aŭtomata puno por fuŝ-laboro, kaj tiu puno konsistas en: ne esti legata.

Nun pri nia soc. literaturo. Ankaŭ ĝi ne prosperis lasttempe. Tamen, ni bezonas literaturon. Ni komencis per tradukoj el naciaj lingvoj; poste sekvos, esperinde, verkoj, kiujn oni el Esperanto tradukos en naciajn lingvojn. Unu

tia verko baldaŭ aperos. Ĝi estas grava studaĵo pri Reforma Mono, parte originala, parte tradukaĵo. Ĝi estas profunda ekonomia esploro pri la kaŭzoj de l' superpotenco de l' mono; ĝi estas plena je socialista spirito kaj verkita en tre klara lingvo. En tiu formo, en kiu ĝi aperos en nia serio, ĝi ne ankoraŭ en iu lingvo ekzistas. La ideo en ĝi traktata, ne estas ankoraŭ studita en soc. rondoj. Sendube, tiu ideo tiras atenton, se ĝi estos konigata en la soc. nacia gazetaro. Estas treege taŭga verko por sendi ĝin kun letero al siaj naciaj soc. teoriuloj, por atentigi ilin je la ideo de reforma mono, kaj samtempe je Esperanto. Estus ankaŭ bonege, aperigi naciajn tradukojn. La libro estas pli dika ol la antaŭaj kaj formas duoblan numeron en nia serio; ĝia prezo estas 16 Sd.

Aperos samtempe broŝuro „La Piramido de la Tiranio”, de la konata holandano Domela Nieuwenhuis. En tiu libreto estas senkompatate nudigataj la karaktero kaj la esenco de l' potenciloj de kapitalismo: instruado, eklezio, gazetaro, juĝistaro, polico, armeo. 32 paĝoj en la konata formato de niaj broŝuroj. Prezo 8 Sd.

Plie estas en preparado traduko de fama parolado de Wilhelm Liebknecht, en 1871, tuj post la franc-germana milito, por ataki „la malnovan mondon de perforto kaj mizero kaj por defendi la principojn de l' nova mondo de libereco, egaleco, frateco”. Kaj tuj ĝi estos sekvata de „La Salajro” de Petr Kropotkin.

Estas, sendube, dezirinde, ke nia serio estu plej eble diversa. Tial devas de tempo al tempo ankaŭ aperi beletristika verko. Nu, ekzistas socia romano, kiu pro sia enhavo kaj pro sia stilo estas unu el la plej brilantaj kreaĵoj, kiuj en tutmonda literaturo estas troveblaj. Tiu verko — parte idilio, parte eposo, parte filozofa esploro de l' abismoj de homa animo kaj de homa socio — naskita de l' genia cerbo de unu el la gigantoj de literaturo, homo de bela vorto, de forta esprimo, de riĉa penso — tiu verko meritas pro siaj ĝeneralaj ecoj esti transmetita en Esperanto, kaj pro sia tendenco, jam pro sia titolo, ĝi meritas aperi nepre en nia serio. Tiu verko estas „La Mizeruloj”, la nemortonta majstra kreaĵo de Victor Hugo. Mi tradukis jam parton, kaj mi treege ĝojus, se ĝi povus aperi en nia biblioteko, ekzemple en laŭ enhavo iomete memstaraj partoj de tri-kvarobla numero de nia serio, ĉiufoje tia parto post kelkaj aliaj libretoj. En la traduko

estas ellasitaj kelkaj ĉapitroj pri la franca historio, kaj kelkfoje longaj interparoladoj estos rezumitaj, sed neniu kial ajn esenca parto mankas. Nu, kamaradoj, ĉu Jean Valjean, Fantine, Cosette, Enjolras, Gavroche ne devas aŭdigi sin en nia lingvo internacia? Ĉu ni ne devas aŭdi kiel sonas Esperanto en la kloakoj de sub kaj de sur la tero, kiel ĝi sonas en la bagno kaj sur la barikado?

K-doj, suprenomitaj projektoj estas ĉiuj jam preskaŭ faktoj — la 4 unue-nomitaj libroj certe ankoraŭ dum la kuranta jaro aperos. La kostoj, parte poste pagotaj, certe ne estos kovreblaj per la nura vendado — do, se tio iel al vi estas ebla, helpu nin, ĉu per abono por serio de 12 n-roj (1 Sm.), ĉu per mendo de kvanto da ekzempleroj por vendo inter la lokaj esperantistoj (25 % da rabato se oni pagas antaŭe), ĉu donacante helpmonon, por kio estas de nun malfermita subtenujo: Por nia literaturo.

Bildoj de malriĉeco.

Veraj skizoj pri la homa vivo, tia kia ĝi estas hodiaŭ de W. J. CHAMBERLAIN.

Elĉerpajo el „The Labour Leader”.

Kiam ni legas, ke proksimume 12.000.000 homoj ĉiam ekzistas atendantaj ĉiumomente atakon de la lupoj „la mal-sato”; ke proksimume 20.000.000 kategoriigas sub „mal-riĉa”; ke en Londono sola pli ol 1.000.000 personoj akiras malpli ol 10½ spesmilojn ĉiusemajne po familio; ke preskaŭ 3.000.000 personoj en Granda Britujo loĝas en tro dense okupataj domoj enhavantaj meznombre en ĉiu ĉambro po tri homoj; ke ĉiam troviĝas armeo da ĉirkaŭ 700 000 publikulinoj disdividitaj inter la urbegoj; ke preskaŭ 30 procento de la infanoj naskataj en malriĉeco mortas antaŭ ol atingi la aĝon de 12 monatoj, kaj pli ol 50 procento mortas antaŭ ol atingi la aĝon de kvin jaroj — kiam ni ĉi tiun nudan raporton da faktoj legas, kian impreson ni ricevas?

Nu, kompreneble, tio dependas de nia vidpunkto. Sperta politikulo eble ne atentus la faktojn, opiniante, ke ili estas multe trograndigataj, aŭ la faktojn li eble akceptos, sed insistos, ke nenio estas farebla antaŭ ol oni nuligas la „ĉambron de lordoj”, faras leĝon por malestabliti la eklezion

en Kimrujo, kaj sufiĉe fortigas nian militŝiparon por ke ĝi „venku la mondon”. Iu el la malnova skolo de religiaj fervoruloj bedaŭrus tian staton de aferoj kaj tuj argumentus, ke ĉar ĉi tiuj demandoj estas tute „materijaj”, tial ne estas ia devo de la eklezio interveni. Li tamen, kredeble, aldonus, ke estas lia firma konvinko, ke ju pli malfacile iu vivadas en ĉi tiu mondo, despli facile tiu vivados en la estonta! Konkludinte tiamaniere la demandon laŭ niaj diversaj fantazioj, ni komencas diskuti la plej lastajn „Markonigramojn”, aŭ ĉu „Ulster” vere batalos, aŭ ĉu estas dece ke ĉefo de Laborista partio tiom forgesu sian plebejan devenon ke li permesas al si la arogantecon mortpafi tigron. Aŭ eble ni povus eĉ interesiĝi pri la liverado de dormĉemizoj kaj silkaj ĉapeloj al sovaĝuloj.

Je risiko difekti vian apetiton, mi volas, tiel bone kiel mi povas, devigi vin reale kompreni la tutan signifon de ĉi tiuj faktoj. Mi volas, se mi povas, vivi en via memoro tiujn sekajn ciferojn kaj tuŝi la fundon de via koro. Por tion fari mi flankentiros la kurtenon kaj tiel lume kiel eble montros al vi tion, kio estas „vivo” al vere milionoj da loĝantoj de ĉi tiu „plej riĉa kaj plej prospera lando en la mondo.”

I.

Jen, do, strato en kvartalaĉo ¹⁾ de . . . Nu, eble estas pli bone ke mi ne diru kie; ĉiuj kvartalaĉaj stratoj (slumoj) estas similaj. Ĝi konsistas el nombro da malpuraj mizera-spektaj „domoj”, luigataj po ĉambre; unu du mallogaj butikajoj kun „miksajoj” en kies fenestroj troviĝas margarino kaj hepato, alumetoj, kandeloj kaj faskoj da ligno malorde amisigitaj; malpura butikoj, honorata per la nomo „Marine Stores”, superplenigata per odoraĉantaj ĉifonajoj, ostoj kaj feloj, kaj stranga kolekto da objektoj ĉiuspecaj; kaj tri drinkejoj, unu sur la mezo kaj unu ĉe ambaŭ finiĝoj de la strataĉo.

Kiam ĉi tiuj stratoj estis nomataj, certe en Hadeso aŭdiĝis laŭtega ridado, ĉar oni legas nomojn tiajn, kiaj „Paradiza Vico”, „Anĝela Korto”, „Am-vojetoj”; granda nombro nomiĝas laŭ sanktuloj.

1) Mi proponas uzi por kvartalaĉa strato la (el angla lingvo prenitaj) vorton *slumo*: strato konforma al la priskribo en tiu ĉi artikolo. [RED.]

Preskaŭ ĉiu ĉambro en ĉi tiu strato okupiĝas de almenaŭ ri personoj; efektive, se familio luas du ĉambrojn, tiu estas opiniata tute mezranga. Kaj kiaj estas la ĉambroj?

Jen priskribo pri unu. Ĝi estas unu el tri aŭ kvar super butikoj kaj pro tio ke ĝi staras ĉe la supra etaĝo, ricevas iom pli da suno kaj aero. La amplekso estas proksimume duono de ordinara ĉambro en domo de mezranga laboristo, kaj mezkreskulo povas tuŝi la plafonon per la fingropintoj.

Kutimiĝinte al la preskaŭ sufokantaodoro, oni unue rimarkas ke la plafono kaj muroj estas malbeligitaj de abomenaj fiinsektoj; pro malseko la tapeto dependas malrigide de la muroj kaj oni preskaŭ povas vidi ĝin movi pro la nesto da rampaĵoj post ĝi.

Se oni paŝus peze tra la ĉambro, falus de la plafono pecetoj da stuko portantaj kun si vivantan ŝarĝon. La plimulto el la vitroj en la sola fenestro estas fendhava kaj papero estas algluita sur la fendoj por bari al la vento.

La „meblaro” konsistas el malnova fera lito, subtenata ĉe unu angulo per kesto de sapo, kaj kiel litaj uziĝas malpura matraco plenigita per pajlo kaj fiinsektoj; unu, du malpuraj ĉifonoj anstataŭas litotukojn kaj sortimento de eluzitaj vestaĵoj kaj paktolo anstataŭas litkovrilon.

La lito mem okupas preskaŭ duonon da la ĉambro, kaj tablo, du difektitaj seĝoj, renversita kesto kun peco de tapiŝo alnajlita, alia kesto da karbo kaj ligno, kaj ankoraŭ alia kesto uzata kiel vestajtenejo kompletas la inventaron.

La ornamajoj konsistas el fotografajo en orita kadro, kiuj jam de longe perdis la freŝecon, tre multkolora bildo de fama generalo, kalendaro por reklami teon, kaj neevitebla biblia teksto alpinglita sur la muro. Malpura peco de drapo pendas laŭlarĝe de la malsupra duono de la fenestro, lampo kun difektita kloŝo, kelkaj fajencaĵoj sur breto, peco de eluzita linoleumo kaj sako sur la planko — kaj la bildo estas kompleta.

Tiu ĉi ĉambro estas dormoĉambro, banĉambro, kuirejo, manĝejo kaj manĝil-purigejo, por geedzoj kaj knabo okjara — antaŭe estis du knaboj, sed la Morto tre kompatis la pli junan.

Mi volas ke vi atente observu ĉi tiun knabon. Liaj gepatroj fariĝis drinkemaj, tiel ili plej facile trovis por si alian medion. Nokton post nokto li enŝteligis en ĉi tiun ĉambron kaj enrampas en la liton. Li ne povas dormi antaŭ ol la gepatroj revenas, tial li kuŝas kun streĉata aŭdado, koro en la buŝo,

atendante ilian revenon. Paŝo aŭdiĝas sur la ŝtuparo kaj li demandas al si ĉu estus la patro aŭ patrino, ebria aŭ sobra.

Malfermiĝas la pordo kaj virino ŝancele enpaŝas kun ruĝa vizaĝo kaj senesprimaj okuloj. Kun plorĝemo li sin turnas al la muro kaj kuŝas sian kapon sub la litajojn.

Dum la horloĝoj batas la dekunuan horon li estas maltrankviligata pro malharmonia miksaĵo de kriegoj kaj blasemoj; la drinkejo kontraŭa eljetas siajn homajn ruinojn. La kantaĉoj kaj malĉastaj ŝercoj forvelkas grade, kaj li aŭdas sian patron penantan supreniri la ŝtuparon, ĝis kiam, kun blasfemo, tiu falas kapantaŭen sur la plankon kaj kuŝas en ebria stuporo.

Tiel pasas nokto en la vivo de ĉi tiu knabo. Liaj tagoj, plej multe pasigitaj ĉe lernejo, kaj pli poste, ĉe laboro, estas rimarkindaj nur pro manko de bonaj manĝaĵoj kaj vestoj. Li jam kutimis al tio; kiam liaj nudaj membroj montriĝas, iu iel havigas al li pli bonan paron da botoj aŭ pantalonon.

Sed la noktojn li timegas. La noktojn kun siaj gepatroj en tiu ĉambro; kun la lin turmentantaj fiinsektoj; kun viro kaj virino jetantaj malĉastajn esprimojn unu kontraŭ la alia dum siaj ebriaj malpacoj, ĝis lia kapeto estas tiom plena de abomenaĵoj kiom ĝi devus esti pri fabeloj.

La unuan fojon kiam vi reaŭdas tiun klasikan esprimon „La geknaboj de hodiaŭ fariĝos la homoj de morgaŭ”, mi deziras, ke vi pripensu tiun ĉi knabon, vivantan „hodiaŭ” en medio en kiun vi ne kondamnis vian dorlotatan pudelon, kaj poste elkalkulu, laŭ la leĝo de meznombroj, kia viro li fariĝos „morgaŭ”. Mi permesas al mi diri al vi ke, tion farinte, vi demandas al vi, ĉu, konsiderante ĉion, justeco ja vere postulas ke oni pendigu mortigintojn kaj skurĝu tiujn, kiuj virinkomercas.

(Daŭrigota).

Post la Milito.

(LETERO EL TURKUJO.)

Konstantinopolo, 18an de Septembro.

La mizero en la urboj. — La bruado de la bulgaraj kanonoj ne plu aŭdiĝas en nia urbo, kiel antaŭ kelkaj monatoj, kaj la terura spektaklo de la elmigrantoj kaj vunditoj preskaŭ malaperis.

La interbuĉado de la kristanaj ligiĝintoj kaj la teruraj bataladoj kiuj okazis, donis la tempon kaj la kuraĝon al la regantoj de nia malfeliĉa lando, perdi ilian sintenon de venkitoj kaj rekonkiri malgrandan parton de la teritorioj perditaj. Adrianopolo, Kirk Kilissé kaj eĉ Dimotika restas — laŭ la decidoj de la konferenco de Konstantinopolo — sub ilia dependo. Tiamaniere, sinjoroj Junaj-Turkoj kredas esti forigintaj la malkontenton de la popolo kontraŭ ilia tirana subpremado, kaj esti bone apogitaj sur la rego. Kaj la popolo, blinda, kiel ĉiam, plena je antaŭjuĝoj, restas muta kaj obeema.

Sed la konsekvencoj de la milito, manifestas sin teruraj, kaj la perdoj rilate homojn kaj bienoj estas nekalkuleblaj.

Amaso da familioj senigitaj de siaj subtenantoj ne plu havas rimedojn por gajni sian vivon. La turkaj virinoj, al kiuj religio kaj mahometanaj kutimoj malpermesas eĉ sin montri al la viroj, komencis labori ĉe la vendejoj kiel vendistinoj kaj laboristinoj; kaj ĉar la mizero estas malbona konsilanto, la manko de laboro jetas ilin en la plej teruran ekspluatadon: tiu de siaj logaĝoj.

Mi vidis da ili, kun teruro, ĉe preskaŭ ĉiuj malĉastejoj, kaj mi povis legi sur iliaj vizajoj la honton kaj la malesperon.

Ĉiuj kompanioj industriaj kaj komercaj de nia urbo — profitante la grandajn laborproponojn de la vere armeo de la gesenlaboruloj serĉantaj oficojn — forpelas sian malnovan oficistaron por anstataŭi ĝin per gelaboristoj pli malsatantaj kaj malpli kostaj. Tiamaniere, la salajroj estas malaltigitaj de 40 kaj eĉ 50 po %, dume la vivo multe plikariĝis.

La mizero de la kamparoj. — En la provincoj, la mizero estas ankoraŭ pli granda. La rikolto preskaŭ produktas nenion ĉar la brakoj kiuj devis ĝin fari, estas nun etenditaj, kiu scias sur kiu batakampoj! Eĉ tio, kion produktis la virinoj, la maljunuloj kaj la geknaboj, estas preskaŭ senvalora, ĉar la solaj transportrimedoj, ekzistantaj en la plej granda parto de niaj provincoj: ĉevaloj, veturiloj, bovoj k.t.p. estis rezervataj por la bezonoj de la armeo. Plie, vintro alproksimiĝas, vintro malvarma kaj rigida, tiel terura por la malriĉuloj kiuj ne povis provizi sin dum la somero, tempo de laboro kaj de abundeco.

Ĉie mizeroj kaj ruinoj! Ĝis la publikaj financoj. La registaro ĉion elspezis por la milito, eĉ la pensiojn de la ŝtataj oficistoj. Tiuj lastaj, kiuj ne plu estas salajrataj de kvar plenaj monatoj,

sin liveras al la subaĉetiĝo kaj al ĉiuspecaj arbitraj agoj kontraŭ la popolo.

Bedaŭrinde, nenio montras al ni ke popolo ekvekiĝis por agi mem kaj labori por sia emancipado. Enprofundigita en la plej granda nescio, ĝi ne povas antaŭvidi la veron kaj sin submetas al sia malfeliĉa sorto. La sola rimedo por lin helpi: La libera lernejo kaj la bona libro mankas. La homoj kapablaj ĝin instrui ne ankoraŭ prezentis sin. Jen kial la malgranda nombro da infanoj de la popolo kiuj ni estas, ni sentas nin senpotencaj; niaj penoj perdiĝas en oceano da socio, da sklavoj kaj da tiranaj mastroj. Malgraŭ ĉio, ni ne malkuraĝiĝas. Ni laboras por atingi nian celon kaj niaj penoj ne estas neutilaj. Tie ĉi, ni penadas restarigi kion la milito detruis kaj reorganizi la laboristan klason disigitan.

Ĉe Smyrne, niaj kamaradoj laboras kiel ni kaj kun sufiĉe da sukceso. Striko de la havenistoj, kiu daŭris 20 tagojn, finiĝis antaŭhierau per kompleta venko por la laboristoj. Ili ricevis la naŭ hor-laboron, plialtigon de la salajro de 25 %, kaj la akcepton de sia sindikato. Granda sukceso por ni, rilate la cirkonstancojn kiuj estas tute malfavoraj.

El la „Bataille syndicaliste”. ZACHARIAS VEZESTENIS.

Tradukis F. S., Liberigstelano.

SOCIA MOVADO.

El Anglujo.

Dublin! Je la 26a de Aŭgusto okazis striko de la tramveturilistoj. Poste oni malliberigis tri el la estroj de la unuigo, pro incitaj paroladoj ĉe kunveno. Sub la kondiĉoj, ke ili ne plue incitos, oni liberigis ilin, escepte S-ro Connell, kiu rifuzis promesi. Intertempe la unuigancoj aranĝis okazigi grandan kunvenon, sed la registoj lokaj eldonis malpermeson. Je la aranĝita kunventempo, S-ro Larkin aperis ĉe la fenestro de hotelo, kaŝe vestita, kaj ekparolis.

Tuj la policanoj kapfrapis ĉiun atingeblan per la bastono, kaj ĉirkaŭ tri cent vundiĝis, unu mortis. Samtempe en Cornwall la policanoj vundis tri dek argilministojn, kiuj strikis. Sed post ne longe, oni esperas, ke la laboristoj pli zorgos pri la sindefendado dum militoj kontraŭ la burĝa regado.

Je la 18a de Sept. mortis S-ro Quelch, kiu longe sindonis al la movado socialista ĉi tie.

S-ro Bowman, la sekretario de sindikalista ligo, (kiu bedaŭrinde ne ankoraŭ fariĝis esperantisto) dankas la multajn kamaradojn, kiuj sendis fratajn salutojn al la kongresanoj.

El Aŭstrio.

En la nuna jaro 1913 mankis en Aŭstrio ĉe la rekrutiĝo: 112.000 rekrutoj! La armeo, krom tio, perdis almenaŭ 30.000 da soldatoj. En Kanado loĝas 90.000 aŭstria rekrutoj kaj rezervo-soldatoj. Eĉ ŝajnas, ke ne venas al ili la penso reiri hejmen defendi l' amatan patrujon! Nia registaro pripensas, kiel ĝi povos nebligti tiun elmigradon de junaj viroj per novaj, pli severaj leĝoj.

ANTES.

La milito en la Balkanlandoj, priokupis tiel forte aŭstrian registaron, ke ĉi tute forgesis la bezonojn de l' popolo enlanda; ĝia intereso koncentriĝis je senĉesa eltrovado de protektoj por enmiksi sin en la milito, kaj je defendado de la novbakita lando Albanujo.

Por tiu celo estas altrovita fi-afero de la Aŭstr. konsulo en Prizren kaj por tiu celo, oni ĉieleble subtenis la Albananojn, por ke ili fariĝu ilo de la aŭstria politiko. Krom tio, oni dum dek monatoj haltigis mobilizitan armeon sur limoj de militanta Serbio. La kostoj de tiu sencela mobilizado iĝas je 600 milionoj da kronoj.

Reservistoj, patroj de familioj, grandparte perdis sian okupon, pro longa foresto. Multaj el ili nek edzinon nek infanojn revidis; ĉar per mizero persekutita edzino, en malespero preferis morton al si kaj siaj infanoj.

Do, per malfeliĉa kaj blinda politiko eksterlanda kaj per kontraŭpopola politiko enlanda, la registaro kaŭzis ekonomian krizon, kies ofero plej parte estas nun laboranta popolo aŭstria. Centoj da laboristoj tage perdas sian okupon. Ilia voĉo kaj voĉo de la cetera popolo estas de surda registaro sisteme ignorata. Novaj kanonoj, novaj dretnaŭtoj, superdretnaŭtoj kaj novelspezitaj 900 milionoj da kronoj por la armigado, estas respondoj de la registaro, malgraŭ proksimiĝanta ekonomia bankroto. La gazetoj tage raportas pri novaj kaj novaj konkurzoj en industrio kaj en la komerco.

Niaj influaj politikuloj sidantaj en seĝoj de ministroj, trouzis sian povon, direktante la politikon kontraŭ popolo kaj ĝia konstitucio.

Mi skribas pri konstitucio — efektive regas Aŭstrion absolutismo malgraŭ belega parlamento kaj malgraŭ fiere

sin montranta frazo super pordego de la imperiestra kastelo. „Justitia Regnorum Fundamentum” (Justeco estas fundamento de la ŝtato).

Ankaŭ kovrilo de la ŝtata leĝaro fundamenta, estas ornamita per la simila frazo: „Antaŭ leĝo ĉiu homo estas egalrajta”. Ambaŭ ĉi tiuj frazoj estas nenio, ol fanfaronna mensogo. Ĉiu eĉ plej malgranda infano, sentas aŭ korpe aŭ spirite ke en Aŭstrio ne regas konstitucio nek justeco. La s-oj de la leĝoj estas fleksataj laŭ bezono de la biokracie reganta partio klerikala, je malprofito de la cetera popolo. La plej bona pruvo de tia estas la fermo de la landa parlamento en Bohemujo, kaj kontraŭleĝa fermo de lernejoj de la bohemia lingva loĝantaro de Vieno.


Estas memkomprenebla fakto, pruvita de multaj pedagogistoj, ke la infano plej bone progresas, se ĝi estas instruata en sia lingvo gepatra. Precipe laborista infano bezonas bonan edukadon tuj en lernejo popola; ĉar pro mankanta mono, ĝi ne povas viziti lernejon pli supran. Ankaŭ bonedukita infano, fariĝante per sia laboro utila al homa socio, estas pli akirebla al ideo socialista, ol analfabeto, aŭ ol infano edukita en patriota lernejo alilingva. Per tia patriota edukado en fremdlingva lernejo, la infanoj fremdiĝas al siaj propraj gepatroj, mokante ilian lingvon. Ĉi tiuj motivoj devigis bohemian loĝantaron en Vieno, konstrui al si aparte lernejojn privatajn. Ke tiuj lernejoj estis brutale, ja perforte kaj kontraŭleĝe fermitaj, tion priskribis jam k-do Cnarf en sia artikolo „Kultura barbareco”, en iu n-ro de la pas. j. Aldone al tiu artikolo mi nur sciigas la legantaron de nia Revuo, ke tiu kultura skandalo estas daŭrigata je silenta konsento de la tuta aŭstria registaro.

La germanaciaj ŝovinistoj, sub gvidado de klerikala Viena urbestro, kolektas nun petsubskribojn per kiuj oni volas devigi la monarhon, ke li sankciu proponatan leĝon kontraŭkulturan. Per tiu leĝo oni celas la solan instruadon germanan, en ĉiuj lernejoj de tuta Malsupra Aŭstrio. Alivorte ĝi celas perfortigon de la negermanoj.

Por tiu malnobla celo estas dissenditaj 10 653 da paperfolioj, sur kiuj jam troviĝas 673.300 da subskriboj.

Rimarkinde estas, ke germanaj instruistoj en XIIIa Viena distrikto, mem rifuzis doni siajn subskribojn al tia abomena, ja kontraŭkulturo celo. Pro tio kelkaj al ili estas suspenditaj. Se tiu leĝo efektiviĝos, ĝi estos makulo en pedagogia historio aŭstria.

Patentita sangsuĉ=aparato.



La ekspluatanto al la elsuĉata infano: „Nu, etulino, kia okazo por ci por sperti la veron de l' biblia konsolo, ke estas pli feliĉege doni ol ricevi! En posta vivo ci min dankos por tio!”

(Desegnaĵo de s-ro William Dyson en angla „Daily Herald”, agema batalorgano por la strikantaj laboristoj en Britujo; dediĉata al ĉiuj, kiuj grasigas sin per infanokarno kaj al ĉiuj defendantoj de industria infanmortigo, speciale al la infanekspluatantoj en Dublin’).

Je fino de mia letero mi ne povas ne tuŝi la ĵus finitan elektadon en Ila Viena distrikto.

Ĉi tiun distrikton reprezentis en parlamento ĝis sia morto la mortpalita k-do Fr. Schumeier. Kiam lia mortiginto, Kunĉak, estis kondamnita al pendigo, la vidvino de la falinta k-do sendis leteron al justicministro, petante lin, ke li malhelpu lian mortpunon. Kaj nun politika heredajo trairas al klerikala partio.

Ilia kandidato D ro Mataja ricevis dum rea voĉdonado la 14an de Oktobro 9015 da voĉoj.
La soc. dem. Eldersch 8455 ” ”

La klerikala partio reakiris tiun ĉi distrikton nur per trompo; ĉar 838 voĉdonrajtigiloj de forvojaĝintaj aŭ mortintaj elektantoj, ili alproprigis sin, kaj disdonis ilin al klerikaloj. Ĉiuj urbaj ofistoj estis komanditaj al agitacio por sia klerikala kandidato. La voĉdonbiletoj estis de iliaj superuloj signitaj per nomo de la klerikala kandidato. Tiun elektadon oni en Aŭstrio nomas egala kaj sekreta voĉdonrajto.

O.—B.

El Bohemujo.

Absolutismo. — Kunsidoj de landa parlamento en kiu partoprenis — dank’ al voĉdonleĝo — eĉ ne unu soc.-dem. laborista deputito, ĉesis. La kaŭzo — konstanta interbataloj de du en Bohemujo loĝantaj nacioj, Bohemoj kaj Germanoj. Sed, sub la vorto nacioj estas eĉ ni opiniataj nur superaj klasoj, ĉar el 1.400.000 da regnantoj posedantaj voĉdonrajton al parlamento tutaŭstria, pli multe ol 800.000, estas tute senrajtaj koncerne la administradon de la landa politiko. Voĉdonrajton al landaj institucioj (landa parlamento, komunumoj) posedas nur tiuj, kiuj pagas almenaŭ 8 K. rektan imposton.

La parlamentistaro tiel kreita, el anoj responddevaj al granda plimalmulto de la loĝantaro, estis dum lastaj kvin jaroj tute ne kapabla — pro konstantaj diskutoj de bohemiaj kaj germanaj patriotoj — fari ian fruktoportan laboron. Nun pro germana obstrukcio kaj manko de mono, la agado tute ĉesis; tiu ĉi parlamentistaro eĉ ne estis kapabla renovigi ĝusttempe la finiĝintajn impostojn, kaj tial preskaŭ tuta administrado de la lando estas nun bazita sur je kredito kiu lasttempe ankaŭ estas elĉerpita.

Nun administras la landon 7 membra komisistaro pure burokrata definita de Aŭstria imperiestro kiu estas samtempe

reĝo de Bohemujo. Ĉi tiu komisistaro plialtigis impostojn el biero je 4 K. el unu H.L. kaj landaj impostoj je 10 %.

Laboranta popolo, tute esceptita el ĝisnuna administrado de la lando, estas tiamaniere devigata pagi ŝuldojn kiujn ĉi tiuj „reprezentantoj de germana kaj bohema popoloj” faris, kaj tial ĝi protestas kontraŭ ĝisnuna stato kaj kontraŭ enkonduko de burokrata absolutismo en unu plej industria kaj plej riĉa lando de Aŭstria monarĥio.

Soc.-demokrataj partioj germana kaj bohema eluzadas ĉi tiun oportunan momenton kaj batalas forte por atingi universalan sekretan kaj egalan voĉdonrajton por ĉiuj landaj institucioj. Protestkunvenojn publikajn partoprenas multegaj amasoj de plej vasta publiko. Samtempe estas proklamita admono ke oni trinku kiel eble plej malmulte da biero; ĉi tiu ankaŭ sufiĉe efikas.

Kiel la afero finiĝos estas ankoraŭ nekonate, sed laŭ skribado de gazetoj la registaro jam proponis fari unu kurion de voĉdonantoj por tiuj, kiuj ĝis nun voĉdonrajton ne havis. Sed eĉ kontraŭ tio ĉi malmulte batalas germanaj ŝovinistoj, proklamante ke tio estus plifortigo de bohemoj, ĉar ĉi tiuj devenas plej multe el malriĉaj regionoj kaj estas nun en de riĉaj germanoj posedataj regionoj senrajtaj parioj.

Nun regas nin burokrata komisistaro. Kiel estos mi ne forgesos informi pri ĝi. VERAMO.

El Franclando.

La laboroj de la anarĥiista kongreso. Pri antiparlamentismo. Tiu ĉi vorto tre eble sonas malagrabla ĉe la oreloj de niaj kamaradoj, batalantaj por uzi parlamentismon. Ili havas iluziojn pri la profitoj riceveblaj de parlamenta demokratio. En tiu ĉi lando, de pli ol kvar dek jaroj, tiu ĉi trompaĵo estis eksperimentata.

La socialista partio, kiu komence estis kontraŭ la konkiro de regpotenco, baldaŭ ŝanĝis sian opinion, kaj nun la principoj estas anstataŭitaj de la „necesegeco” havi multe da deputitoj ĉe la parlamentejo.

Por havi multe da ili, la kandidatoj forgesas por iom da tempo ke ili iam, kaj ankoraŭ kelkafoje, parolas pri klerigo de l' popolo. Ili flatas ĝiajn malvirtojn, aŭ klarige pravigas la malvirtulojn. Ili ĉiam diras ke ili laboras efike, nur kiam ili estos multege.

Nu, vidinte tiun longan eksperimenton, tiun trompajon (kiu instigas la homojn atendi sian savon de „modernaj

savantoj” ne farante pli gravan penon ol enmeti paperpecon en skatolon, nur kiam oni alvokas ilin por tio), la anarĥiistoj, kiuj estas en la „socialistaro” kaj sincere volas liberigon, alproklamis militon al parlamentismo.

Antaŭ tri jaroj, dum la balotperiodo, la anarĥiistoj vigle kontraŭbatalis, ili montris ke estas tiom malhonoriga al tiu kiu ordonas, kiom tiom estas al tiu kiu obeas. La kandidatoj parolas pri egaleco, kaj ili sin prezentas por ke oni igu ilin super la obeantoj.

Tio estas malmorala por ĉiuj.

Sed parolu pri moraleco kaj frateco al deputotoj! Eĉ tiuj kiuj parolas pri libereco — kiam ili estos sufiĉe nombraj — alvokis la policistojn por gardi la enirejon de siaj publikaj kunvenejoj, kontraŭ la anarĥiistoj.

Ili bone agis ĉar kiel gvidi malriĉulan ŝafaron riĉiĝante, se ĝi aŭdus liberecamanton?

La kongresanoj konservis la malamon al parlamentismo, kaj al ĝiaj profitantoj, kiuj estas socialistoj nur pro uzurpo de nomo apartenanta al malprofitemuloj.

La fina vorto estas ke „parlamentismo estas malfeliĉego, kies sekvaĵoj estas tiom venenigaj, kiom tiuj de alkoholismo.”

La proksiman jaron ree okazos tiu malmorala kaj malmoraliga elekto, la anarĥiistoj montros al popolo la danĝeron de tiu papero, kaj la valoron de la fido je si mem; „la liberigo de l' popolo estos la laboro de la popolo mem”.

Pri la reciproka helpo la kongreso aŭdas raporton pri la helpo al la kondamnitoj kaj al la familioj.

„Resume, la reciproka helpo, tiu grava aganto por la vivo kaj la kresko, kies gravecon malkovris al ni Kropotkin, estas por la anarĥiistoj ordona neceseco.

Ĝi do devas esti materia, morala kaj intelekta por esti kompleta al ili. Ili deziregas luti siajn penojn por certigi reciproke al si, tiujn kondiĉojn; ili, kiuj estas, mi tion rediras, la celo de ĉiuj potencoj reakciaj, kaŝitaj aŭ konfessitaj, en ĉiuj landoj, sub ĉiuj regmanieroj. Estas la bazo mem de ilia ekzisto kaj tiu de ilia idealo.”

La ĝenerala striko kaj la rilatoj de la anarĥiistoj en la sindikatoj estis ankaŭ grava demando.

La sindikatismo ne estas idealo, sed nur batalmaniero. Estas bone ke la anarĥiistoj iru en la sindikatojn, sed ili restu simpluloj, ili ne estrigu.

Pri la organizo de la anarĥiistoj mi traktis tion — tre nesufiĉe sed nia papero ne pligrandiĝas — en la antaŭa

numero. Tio estis la ĉefa demando. La nomo de la organizado estas „Komunista Anarĥista Revoluĉema Federacio de Francilingvuloj”. Tio ŝajnas tro longa nomo? Tute ne. Ĝi estis necesa, la vortoj tiom perdas sian iaman signifon! Kun tia nomo estas neeble konfuzi.

Pri aliaj demandoj, antimilitarismo, kreo de internacia oficejo (sen Esperanto, ĉar neniu parolis pri ĝi), edukado de l' infanaro estus bone elmontri, sed kamarado redaktoro opinius ke mi trouzas, mi provas ilin trakti en alia okazo.

La kongreson plenumis la taskon, kiun ĝi proponis al si, „klarigigi la anarĥistan penson kaj dissemi ĝin”, tio komenciĝis ĉe la kongreso, nun grandaj afiŝoj, folietoj traportas la liberigan parolon.

La libereco estas sur la vojo al kiu ni iras, ni lasas post ni, la ordonantojn kaj la obeemon, kiuj estas eĉ demokratigitaj la sklaveco malbeninda.

A. PANLOU.

P. S. En la lasta no. paĝo 249a 12a linio: Individualismo estas kontraŭ plibonigo La Itala kamaradino estas Maria Rygier; la vorto „reznis” sur la 249a paĝo povas esti ŝanĝata per „malaprobis”, „kondamnis”.

Tio pro nekompreneo konigita al mi.

A. P.

El Portugalujo.

La persekutado de la libera gazetaro sub prezido de Alfonso Costa. — Nia kamaradoj de la jurnalo „O Syndicalista” adresas al ni la jenan proteston pri la persekutadoj ricevitaj de la revoluciema gazetaro:

Neniu memoras en Portugalujo tian teruran periodon, kian ni travivas de kelkaj monatoj. De kiam prezidanto Costa komencis, estas neeble skribi aliaĵojn ol laŭdadojn pri la registaraj agadoj.

La jurnalo „O Syndicalista”, organo de nia plenumanta komisiono de la 2a sindikatista kongreso, kaj la anarĥista jurnalo „Terra livre” ne plu aperas jam de longe, simple ĉar prezidanto kaj liaj ministroj malpermesis tion.

Kiam polico ekscias, ke iu suprenomita jurnalo estas sub presado, ĉe Lisbono, ĝi invadas presejon, prenas la jam pretajn ekzemplerojn, devigas detruigi la kompostojn kaj minacas la posedanton per malliberejo se li lasas eliri iun numeron.

Se la jurnalo estas presita ekster Lisbono, sen la scio de polico, la policistoj elŝiras ĝin el la manoj de la vendistoj, kiuj estas malliberigitaj dum 24 horoj kaj minacataj de longa mallibertempo se ili ree daŭrigas la vendadon.

Kiam administranto de „O Syndicalista” estis arestita, polico traserĉis lian hejmon, elportante ĉiujn administraciajn dokumentojn, inklusive la liston de la abonantoj kaj disdonantoj, kiun ĝi konservas por ke la abonantoj kaj legantoj ne povu ricevi la jurnalon.

Tamen neniu el tiuj gazetoj estis trenata antaŭ la tribunalojn! Kial? Ĉar la pripresa leĝo ne permesas la tempnan ĉesigon de iu publika presaĵo.

Nur du leĝaj rimedoj sin prezentas al registaro: 1e. kulpigi la numeron lasante ĝin disvastiĝi; 2e. malpermesi tiun disvastiĝon, kiam oni opinias ĝin danĝera por la publika kvieteco kaj institucioj; sed tiam la aŭtoro de la kulpigita artikolo devas esti senprokraste arestata kaj juĝata.

Sed la tirano Costa, sufokante propramane leĝon sian, ne volas ke tiuj jurnaloj estu frenataj antaŭ tribunalojn — ĉar li timas ke la publika opinio sciu ke nenio justigis tiujn netolereblajn persekutadojn — kaj por silentigi li ordonas la sisteman kaptadon de ĉiuj numeroj . . . mokante tiamaniere la leĝon.

Joao Franco — la malŝatata ministro de monarĥio, kiu per siaj trouzoj kreis ĉirkaŭ reĝo Carlos malaman kaj ribelan atmosferon, kiu okazigis perfortan morton (atenco de la 1an de Februaro 1908) — Joao Franco, tiel fortege atakita de la nuna prezidanto en la parlamento kaj la mitingoj pro la forigo de la individuaj liberecoj kaj precipe de la gazeta libereco; Joao Franco neniam faris ion similan je tio, kion faras hodiaŭ la trompisto kiu regas tiumomente! Joao Franco, en pli malfacila situacio nur aplikis la leĝon, sendante al tribunaloj la revoluciemajn jurnalistojn, ne timante la juĝojn kiuj estis veraj mitingoj propagandaj kontraŭ monarĥio!

El la „Bataille Syndicaliste”, 22an Sept.

Tradukis F. S., Liberigstelano.

El Rusujo.

Proceso de Beilis. La proceso de Beilis allogis atenton de la tuta mondo. Sufiĉe estas rimarki, ke la burĝa gazetaro el tuta Eŭropo sendis raportantojn. Sufiĉe estas rememorigi, ke la korespondanto de angla „Times” ricevis mandaton telegrafi ĉiutage du mil vortojn. (Ankaŭ en Amsterdam okazis granda protestkunveno, en kiu parolis eminentuloj el ĉiuj partioj. Red.) Estas tute kompreneble, kial tiu ĉi proceso allogis tian atenton: sur la benko de juĝatoj oni lokigis plej simplan laboriston kaj diris: li estas kani-

balo kaj sangsoifanto, ĉar lia religio dekretas al li trinki infanetan, homan sangon. Vane estas klopodo defendi sin; je la krio: „Ne, nek mi, nek la nacio al kiu mi apartenas — ni ne estas kanibaloj, ni ne trinkas homan sangon!” krias responde la nigrcentanoj, prokuroraj kaj juĝaj esploristoj: „Vi trinkas, vi trinkas! — en malliberejon, al katorgo lin.” Kaj jen lin, sola homo, oni ĉirkaŭigas per densa ringo da armigita gardistaro, evidente, ke li ne forflugu tra la fenestro al libereco. Sed li estas trankvila, nur de tempo al tempo direktas la rigardon al sia edzino, iufoje subite ekploregas kaj plorante submetiĝas al sia maldolĉa, turmenta sorto

Sed tie, trans la prokurora katedro — la prokuroro Wipper estas konvinkita, ke eĉ en niaj tagoj inter ni vivas kanibaloj. Li estas tie — unua violono, li estas alsendita el Peterburgo — en Kievo oni ne trovis tian lertulon.

Vi devas scii, ke Beilis estas arestita longe post malkovro de mortigo, kiam oni volis doni al la proceso la karakteron de riteco. Tuj post kiam oni trovis la kadavron de Jusĉinsky, nigrcentanoj jam sen juĝistaro kaj juĝa esploro donis al la afero la signifon de riteco kaj decidis aranĝi pogromon. Jen unu el ŝlosiloj de tiu ĉi eksterordinara por la tuta civilizita mondo proceso — unu el tiuj ŝlosiloj per kiu malfermiĝas la kesteto de vero.

La proceso antaŭeniras per malrapida ritmo.

La civilaj kulpigantoj kaj prokuroro, ĝuste dirante, tute forĝesis pri Beilis. Oni diskutadas pri ĉiuj kaj ĉio, nur pri tiu, kiu havas rilaton al la proceso. Sed tio, se vi volas, tiel ja devas esti. Ĉu io koncernas ĉi tie al Beilis? Li ja estas kulpa nur por tio, ke li estis la plej proksime loĝanta hebreo de kaverno, kie oni trovis la kadavron de mortigita Jusĉinsky. Se ne estus Beilis, necese estus aresti iun alian hebreon, ĉar la ĉefa tasko de la nigrcentanoj estas atingi la jeson de nova kalumnio al hebreoj, ke ili estas kanibaloj, kaj tial ankaŭ danĝeraj membroj de socio kiujn oni devas ekstermi.

El rusa laborista gazeto „Za Pravdu” esperantigis W. A.

El Usono.

En la rivero Hudson estis trovata virinan korpon, tranĉita je naŭ pecoj kaj pakita en kuseno. La kuseno estis brodita, kaj iu laboristo rekonis ĝin esti fabriko de iu brodajejo. Per la brodajejo, kiu nur fabrikis unu dekduon da tiaj kusenoj,

oni trovis la meblovendejon, al kiu ili estis liveritaj. Kvar el la 12 kusenoj estis venditaj, laŭ la libroj de l' firmo, al iu s-ro Miller, Bradthurst Avenue. La detektivoj baldaŭ trovis, ke tiu s-ro Miller estis katolika pastro de la preĝejo Sankta Josefo. La pastro loĝis en nomita adreso sub nomo Miller kun la mortigita virino, Anna Aŭmuller, hungarino. En la domo oni trovis krom fotografajojn de Anna Aŭmuller ankaŭ: tri samspecajn kusenojn, sangmakulojn, tutan apotekon kaj diversajn medicinajn aparatojn.

Oni trovis ĉion ĉi dum la pastro en sia preĝejo servis la meson. Post la meso li estis arestata. Li konfesis esti la mortiginto de Anna Aŭmuller, kun kiu li, sub falsa nomo, estis geedzinta; li mem estis preparinta por tio la necesajn paperojn k.t.p.

Oni trovis, ke la pastro, kies nomo estas Schmidt, preparis kaj bonpreze vendis rimedojn por provoki aborton; tiuj rimedojn li pleje vendis al siaj konfesantinoj, kaj ankaŭ al aliaj personoj (tiam sub nomo: D-ro Molière el Parizo). Plie oni malkovris, ke kune kun iu dentisto, D-ro Muret, angla krimulo, li faris falsajn monbiljetojn de 20 dolaroj, el kiuj multaj estas en cirkulado.

Li pretendis, ke li mortigis Anna Aŭmuller en nomo de Sankt-Elizabeto de Hungarujo, kiel ofero al dio, same kiel Abraham oferis laŭ dia ordono sian filon. La falsan monon li faris pro tio, ke estas tiom da malriĉuloj, al kiu li deziris doni la monon. La arton fari monon kaj rimedojn por intenca aborto li ricevis rekte de dio mem!

En la urbo Louisville, Kentucky, estis antaŭ nelonge trovita la kadavro de mortigita knabino. La preĝeja servisto estas por tio kondamnita je dumviva mallibereco, kvankam li forte neas, ke li faris la krimon. Ĉar pastro Schmidt estis proksimume tiun tempon la gasto de l' paroĥestro en Louisville, oni nun supozas, ke Schmidt estas la mortigante ankaŭ de tiu knabino.

La 1a de Septembro estis por la usonaj laboristoj libera tago. Tiu tago estas donaco de la kapitalistoj al la laboristoj, kaj la laboristoj festis, marŝadis en la preĝejojn kaj aŭdis la predikojn de la pastroj, kiuj admonas, ke la kapitalo kaj laboro estas nedivideblaj fratoj, kaj ke la unu ne povas ekzisti sen la alia. La plej granda parado okazis en la katolika katedralo, kie la ĉefepiskopo Farley diris, ke katolikismo estas la ĉiama helpanto inter la egaligo de l' diferenco

inter kapitalo kaj laboro, ĉar ja la katolika religio apartenas sammaniere al la laboristoj kaj kapitalistoj, al la riĉuloj kaj malriĉuloj. Sed socialismo, tio estas unuflanka, ĥaosa afero, kaj tial malamiko de la laboristoj kaj kapitalistoj, sekve ĝi ne povas trovi eĉ plej etan atenton ĉe iu vera kaj fideela katoliko. Ĉiu katoliko aŭ bona kristano devas ĉiokaze peni ekstermi la socialistajn teoriojn el la homaro kaj preĝi al dio, ke la katolikaj teorioj estu bonkomprenataj kaj akceptataj de la tuta homaro.

La laboristoj en la preĝejo, kiuj devenas el irlandaj familioj, kontentiĝis pri tiu diservo kaj remarĝis al siaj klublokaĵoj, kie ili drinkadis laŭvole. Mizeruloj ne povas pensi, ili fidas blinde je siaj pastroj ĝis sentiĝos foje la verecon. Nun ili havas la oportunecon aŭdi pri la pastro Patro Schmidt.

La regnestro de la ŝtato de New-York, William Sulzer, estis akuzata por trompa ŝtelaĉo kaj enkonduko de favorigitaj oficistoj, kiuj helpis lin esti elektata. Li longe sukcesis teni la regnon en sia mano, sed nun li devas iri antaŭ tribunalo kaj atendi la juĝon. Lia kulpo nur povas fortigi la klikon de la tiel nomita Tamany Hall, societo kies estro, Murphy, efektive sed nevideble regnas la ŝtaton de New-York, kaj kiu disdonas ĉiujn oficojn de la regnestro, ĝis tiu de stratpurigisto. Antaŭ kelkaj tagoj mortis unu el ili, nome Sullivan, kiu postlasis 2.500.000 dolarojn, gajnita el la politiko kiel ano de Tamany Hall, kiu regas la ŝtaton, kaj kiun la kontraŭuloj nomas „La Maffia de Nov-Jorko.”

Okazis striko inter la tajlorinoj kiu sukcesis. Ili nun laboras 50 horojn semajne kaj estos pagataj por 3 festtagoj, nome por la novjaro, la unua de Majo kaj la 1a de Septembro.

Kamarado Boyd de la I. W. W. estis kondamnita por 7 jaroj en malliberejo ĉar li ĉe la striko de Silkteksistoj en Paterson, predikas sabotadon, kio laŭ la leĝoj de ŝtato New-Jersey estas malpermesata.

Okaze la izraelidaj festtagoj la templo en la 106a strato enfalis kaj pli ol 40 piuloj vundiĝis el kiuj multaj mortis. Kie estis nun ilia dio?

KLAJIN.

En ĉiuj anguletoj de la terglobo, tie, kie nur batas proletaria koro, eniĝas ĉiam pli kaj pli profunde nova penso, kiu portiĝas en la pura alteco de proletariaj animoj. Malrapide, sed ĉiam antaŭen ĝi enpenetras per certaj paŝoj en la laboristan movadon, kiu dum centoj da jaroj fluis laŭ vojo de pura profesiismo. Inter la konscia proletario vekigis revoluciema

spirito, ili ekdubis pri antaŭaj batalmetodoj. Kaj malnovaj rimedoj anstataŭiĝas per alia taktiko, taktiko de direktaj agoj.

Ankaŭ en la landon de dolaro, trans la granda oceano, alvenis la nova ideo, kaj, kiel ĉie, ĝi ekstremigis la „socialistan partion.” „Gardu vin kontraŭ industriistaĉoj, ne amikiĝu kun sabotaĝanoj, sovaĝaj duonanarĥiistoj, varmegaj kapoj, kriemuloj, kiuj mem ne scias, kion ili volas...” — jen vortoj, kiujn ni legas en social-demokrata presaro, jen „batalrimedoj”(?), kiujn reprezentantoj de „scienca socialismo” uzas kontraŭ la „industriaj laboristoj de l' mondo”. Kiuj do estas tiuj lastaj, kiujn tiel timigas la social-demokratojn?

La asocio „Industriaj Laboristoj de l' mondo” estas kreita fine de 1904a jaro. Ĝis la mezo de 1908a jaro oni mal multe aŭdas pri ĝi: la ĉefuloj volis alproksimiĝi al parlamento, laŭ vera parlamentista taktiko. Sed dum la kongreso (en 1908a jaro) la plimulto de delegitoj decidis forjeti parlamentistajn iluziojn kaj enkonduki senperan ekonomian bataladon. Kvankam kelkaj politikuloj eknomis ilin „anarĥiistoj”, ili preferis porti tiun ĉi „teruran”(!) nomon, ol resti obeemaj ŝafoj.

Kiel fajreroj disportiĝis iliaj pensoj, kaj en ĉiuj lingvoj de la nova mondo aŭdiĝas forta alvoko al senpera, direkta agado.

Por ekvidi ilian sukceson, sufiĉas pririgardi la nuntempan socian vivon en Ameriko. Kion ni vidas? Terurega reakcio regas en tiu ĉi „libera lando”: malpermesataj estas mitingoj, oni malliberigas redaktorojn, k.t.p. Sed tamen la „I.L.” daŭrigas ĉiam pli akre sian batalon, de kio unu ilustraĵon mi volas nun doni.

En Novembro de 1909a jaro komenciĝis en Spokajn terura batalo pro... parolibereco (ĉu ĝi ne estas fundamento de ĉiu respubliko??). La batalo daŭris ĝis Marto de 1910a jaro. Pli ol 500 homoj estis arestitaj. Fine la urbestroj ekvidis, ke tro multe kostas la nutrado de 500 homoj, dum novaj nutrotoj alvenas, kaj ili estis devigitaj cedi. Nun en Spokajn aperas ĉiusemajna organo de la „I. L.”

En kontraŭbatalado de tiuj ĉi revoluciemuloj, kiuj tiel multe ofertas por laborista movado, kuniĝas social-demokratoj kun reakciuloj, la unuaj je l' nomo de la „laborista klaso”, la aliaj de la sankta ŝtato.

Sed ĉu tiu ĉi kontraŭbatalado povas haltigi kreskadon de revoluciema penso, eniĝante profunde en cerbojn kaj korojn de la proletariaro? La soc.-dem. enkondukis dum la lasta partia kongreso en sian statuaron unu punkton (art. 2a), laŭ kiu oni ekspartigas ĉiun, iomete kliniĝintan de severe-parlamentista taktiko; kaj malgraŭ tiu ĉi vere polic-

inda rimedo, aŭ dank' al ĝi, la vicoj de la „I. L.” kreskas, dum la „socialista partio” nombre malgrandiĝas.

La lastan ekkonsciis eĉ la partianoj mem; en la 8a numero de la socialista (ne anarĥista!) gazeto „La nova vivo” (Septembro 1913a jaro) ni legas, ke en la amerika „socialista partio” okazis io, kio povas okazi en neniu socialista partio de la mondo. Ĝi devus nun kunkalkuli proksimume 160 milojn da membroj, dum efektive estas nur preskaŭ 80 miloj; duono da membraro do foriris. Dum unu jaro malaperis tri el la plej gravaj socialistaj gazetoj. La socialistaj laboristoj forturniĝis de la partio k. t. p. Jen la faktoj. Ĉu ili ankoraŭ bezonas klarigojn? M. PERLOV.

ESPERANTA MOVADO.

Liberiga Stelo. — Centra komitato, kunveno de Oktobro. — Kamarado Raimont raportas pri la Berna kongreso. Li opinias ke ĝenerale la esperantistaj kamaradoj aprobis kreadon de internacia federacio sen aparteco de la partioj. Tamen en „Antaŭen” pri la kunveno de la verdsocialistoj sin deklaris favore al internacia federacio eksklusive socialista. La komitato decidis protesti energie kontraŭ la kamaradoj, kiuj ŝajnis ne koni „Liberiga Stelo” kaj sin demandas kial nia asocio ne povus plenumi la parteprenadon de tiu kreota federacio. Estas decidita definitive ke la kotizajtoj de la ne-grupanj aligantoj estos 2 frankoj anstataŭ 3 laŭ la propono de la Sottevilla grupo. La sekretario legas respondojn de 3 kooperativoj kiuj pruntedonas ĉambron por la kursoj. La kasisto legas fine leteron el la Sens'a grupo anoncanta la reaperton de la kursoj. La proksima kunveno okazas la 7an de Novembro.

PETRO ASSELIN,
17 rue des Chauffourniers, Paris.

Wieno. — La „Frateco” Wien'o XVI Laborista Domo, sciigas ke ĝia ĝisnuna prezidanto F. Valka estas vojaĝanta al Brazilujo, kien jam elmigris ankaŭ ĝia kasisto A. Polivka.

La nova estraro konsistas el: Fr. Plachy, prezidanto; J. Kocourek, vicprezidanto; J. Wurzer, kasisto; O. Zimmerman, sekretario kaj la k-do Bliemel, Marsänger kaj Klein.

München. — Antaŭ kelkaj semajnoj en München komenciĝis Esperantaj kursoj por laboristoj, kiuj havas kontentigan nombron da partoprenantoj. Du kursanoj el la laborejo, kie mi laboras, partoprenas kun entuziasmo al nia afero kaj

intencis ekkorespondadi. Mi donis al ili I.S.R., por ke ili havus adresojn. Ili skribis al eksterlandanoj, esperante, ke la sendita karto estos respondata. Vane. Kun honto mi devas konfesi, ke la adresatoj estas nesciante tion, kio malutilas nian movadon. Ne la malkorektan skribmanieron mi kulpigas por la nerespando, mi mem korektigis, sed la frivolecon de la adresatoj, kiuj ne pripensas, ke per tia ago ili malhelpas la progreson de nia movado. Tial mi ree atentigas la samideanojn, kiel estas jam kelkfoje skribita en I.S.R., kiuj enpresigas sian adreson, tiuj ankaŭ havas la devon respondi.

KONRAD DEUBLER.

Barcelono. La legantoj de I.S.R. en Barcelono sendis la 28an de Septembro la jenan karton al Kongreso Sindikatista en Londono: „Kamaradoj de Barcelono per la lingvo internacia Esperanto tutkore salutas la ĉiulandajn kamaradojn kunsidantajn en Londono okaze de la unua internacia sindikatista kongreso, kaj deziras al ĝi fruktoplenan sukceson. Samtempe ni fervore rekomendas al vi la lernadon de la lingvo Esperanto por ke kiam okazos la dua kongreso oni povu uzi tiun lingvon kaj tiel rimarki ĝian utilecon kiel interkomprenigilo. Ricevu la plej sincerdezirojn por viaj justecaj aspiroj.”

Hungarujo. — Niaj kamaradoj volis aranĝi kunvenon por Esperanto en Székesfehérvár, Hungarujo. Ili sciigis sian intencon al la tiea poliestro, por ke li permesu la kunvenon. (En Hungarujo nur tiam oni povas teni kunvenon, se la poliestroj tion permesas). Sed li rifuzis la permeson dirante, ke Esperanto estas la lingvo de ŝtelistoj, kiun la laboristoj nur tial volas ellerni, ke ili poste povu sekrete interparoli post la mastroj, kiuj ne komprenas tiun lingvon.

Nu, ĉu ne estas bele tia rezonado de iu poliestro? Ĉu ne estas feliĉa lando, kiu estas benita per tiaj sagacaj kaj vasthorizontaj viroj, kia estas tiu ĉi eminentulo, Ludoviko Sághy (Ŝagi)? Mi fiksas lian nomon ĉi tie, ke la tuta mondo ekkonu lin, ĉar li meritas tion. Se li plu progresos surtiu ĉi vojeto de l' saĝeco, tiam li baldaŭ fariĝos ministro. Dio lin helpu!

Malgraŭ ĉiuj malhelpaĵoj, tamen 300 laboristoj lernas Esperanton en la nomita urbo. En Arad ankaŭ fondiĝis laborista klubo esperantista, en kiu multaj lernas nian lingvon. En Budapeŝt kamarado Polgár gvidas kurson ĉe la presistoj, por 50 partoprenantoj.

S.

Pli ol unu alia k-do sendis sciigon pri tiu afero al I.S.R.

El la sciigo de iu k-do ni ankoraŭ komunikas, ke pri Esperanto volis paroli la sub-urbestro mem, kaj tiel okazis, ke poliestro malpermesis al sub-urbestro paroladon pri Esperanto tial ke Esperanto estas ŝtelista lingvo!

Tre stranga afero! Poliestro havas ja la taskon atenti la ŝtelistojn. Kiel li povas tion fari, ne konante la lingvon de la ŝtelistoj? Li mem devus unue lerni tiun lingvon, ĉar ja ĉio kio koncernas ŝtelistojn, tio ankaŭ koncernas lin. Aŭ, ĉu eble li ne opinias necese tro ĝeni la ŝtelistojn?

Saĝhy, vi ne agis saĝe, via sago pafita de via Esperanto, trafis vian propran, ne tro sagacan nazon — jen 300 laboristoj... Kio? Vi vere faris efikan propagandon por ni. Dankon, kaj nun vi povas iri, ĝis ni alifojze bezonas vin.

La Esfio. Kunveno de 19/X. — Du kursoj estas organizataj en sekcioj socialistaj. Kamarado faros kurson vespere en lernejo. La sekretario interrilatiĝis kun kamarado de la Germana Asocio pri la laboristaj organizaĵoj esperantistaj; de tiu momento fondiĝis nova verdsocialista Asocio en Belgujo.

Post la lasta milito en Ĥinujo, „Ĥina Socialisto” malaperis. Baldaŭ „Le Travailleur Espérantiste” reaperos.

Delegito en Bern donis kelkajn klarigojn pri du kunvenoj socialistaj; proksiman fojon, en Novembro, ni diskutos raporton pri la decidoj kaj pri la Pariza kongreso.

Kamarado Goldefy estas elektata kiel kasisto. La proksima kunveno okazos la 16an de Novembro.

La Sekretario: SENRONO.

KORESPONDADO.

Germanujo: Fraŭlino Anna Gerlach, Venloerstrasse 441, Köln (Cologne), dez. kor. kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. — K-do Arthur Klaus, Friedrichstr. 5, Eilenburg, dez. kor. — K-do Carl Mailand, Mönchebergstr. 8 5 II, Cassel, dez. interŝ. il. pk., markon bildflanke. — K-do Fr. Roth, ĉarpentisto, en Brunsbüttel (Holstein), ĉe W. Lindner, Mühlenweg, dez. kor. pri sociaj demandoj kaj petas informon pri elmigro al Sud Ameriko.

Hispanujo: K-do Pedro Vidal, Strato Suris 18, Tarrassa (Barcelona), dez. kor. tutmonde pri sociaj aferoj per il. pk. — A. Gorjé, Jardines 9, Bilbao, dez. kor. per il. pk. kun samideanoj ĉiuj naciaj.

Holando: K-do Last, Papenpad 39, Zaandam, dez. kor. kun eksterlandaj samideanoj.